



RIVEREGO

Printempo de 1993

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia

N^o 30^a, Jarkolekto 8^a

Rencontre printannière — Printempa renkontiĝo

La rencontre printannière de la S.Q.E. se tiendra au même endroit que les deux dernières années. Une tradition est sans doute en train de naître. Nous nous réunirons dans une grande maison moderne, près d'un lac; canots et pédalos seront disponibles. Et pourquoi pas un feu de camp?

Programme libre — des propositions sont les bienvenues, surtout pour la soirée de samedi. Des cours pour débutants auront lieu sur demande.

Date: du 11 au 13 juin. Arrivée après le souper, vendredi soir, et départ le dimanche après-midi. L'assemblée générale de la S.Q.E. se tiendra le dimanche matin — l'élection d'un nouveau conseil d'administration aura lieu. Tous les membres sont invités.

Prix: 25\$/personne (coucher en chalet, chambres non-privées; aucune literie n'est fournie). Gratuit pour les enfants de moins de onze ans qui n'utilisent pas un lit à part.

15\$/personne (coucher dans sa propre tente)

Les membres de la Société québécoise d'espéranto et les non-résidents du Québec bénéficient d'un rabais de cinq dollars.

Ces prix ne comprennent pas les repas. Vous pouvez utiliser la cuisine toute équipée du centre, ou commander par avance des repas de la S.Q.E. Les trois repas principaux proviendront du

La printempa renkontiĝo de E.S.K. okazos samloke kiel dum la pasintaj du jaroj. Ĉu kreiĝas tradicio? La renkontiĝejo staras apud lago, sur kiu eblas kanui, pedalboati, kaj en kiu eblas naĝi. Programo estos libera, sed bonvenas sinproponoj, ĉefe por la sabata vespero.

Dato: de la 11^a ĝis la 13^a de junio. Oni alvenu post la vendreda vespermanĝo, kaj foriru dum la dimanĉa posttagmezo.

Estos ĝenerala kunsido de E.S.K. dimanĉan matenon — tiuokaze elektiĝos nova estraro de la Societo. Ĉiuj membroj estas invititaj.

Prezo: 25 \$/homo, por dormi endome (en kelkopaj ĉambroj, kun neniu litaĵo provizita). Infanoj ĝis dek-jara, kiuj ne okupos propran liton, partoprenos senpage; 15 \$/homo, por dormi en propra tendo. Anoj de la Esperanto-Societo Kebekia kaj eksterkebekianoj ĝuas

traiteur végétarien Végé-Cuisine, au prix de 7,50\$ chacun, alors que les déjeuners seront préparés sur place, au prix de 3\$ chacun. Tous les prix incluent toutes les taxes.

Si vous pouvez offrir du transport, ou si vous en avez besoin, faites-nous-le savoir.

Adresse: Aux Berges Dominique-Savio, 545, chemin du Lac, Sainte-Catherine-de-Hatley, en Estrie.

kvindolaran rabaton.

Tiuj prezoj ne inkluzivas manĝojn. Tamen, eblas antaŭmendi manĝojn de la Societo. Ĉefajn manĝojn pretigos la vegetara manĝo-servo Végé-Cuisine, po 7,50\$, kaj matenmanĝojn pretigos surloke, po 3\$. Ĉiuj prezoj inkluzivas ĉiujn impostojn. Se vi preferas mem kuiru, plenekipita kuirejo estos libere uzebla.

Bonvolu sciigi nin se vi bezonas aŭ povas oferti transporton.

Adreso: Aux Berges Dominique-Savio, 545, chemin du Lac, Sainte-Catherine-de-Hatley, apud Sherbrooke.

Formulaire d'inscription en page 4. Aliĝilo en paĝo 4.

Mesaĝo de la Esperanto-Rondo de Otavo

Reage al la letero de Mikaelo Liĉa en la antaŭa numero de La Riverego, la Esperanto-Rondo de Otavo (ERO) volas certigi al la legantaro, ke ĝi ne diskriminacias pro raso, land-deveno, kredoj, religio, sekso, kaj seksorientiĝo.

Ĝenerala kunveno — Assemblée générale

La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia oficiale invitas ĉiujn membrojn de la Societo ĉeesti la jaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos dimanĉon 13^{an} de junio de 1993, ekde la 10^a horo, ĉe la feriejo «Aux Berges Dominique Savio», 545, chemin du Lac, en Sainte-Catherine-de-Hatley, okaze de la printempa renkontiĝo de E.S.K.

Tagordo

1. Malfermo: elekto de kunvenestro kaj de protokolanto; akcepto de la tagordo.
2. Akcepto de la protokolo de la lasta kunveno.
3. Raportoj de la estraranoj kaj demandoj.
4. Elekto de nova estraro — oni kandidatiĝu per letero al la prezidanto ĝis la kunveno, aŭ persone dum la kunsido.
5. Diskuto pri venonta agado.
6. Fermo.

Por la estraro, la sekretario-kasisto,



Sylvain Auclair

LA RIVEREGO

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia.
Aperas trimonate. Eldonkvanto: 150

ISSN 0830-9574. Dépôts légaux:

bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis kaj grafiĉe aranĝis: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Danielle Bédard, Jean-Claude Bélanger, Yves Bellefeuille,
Suzanne Bolduc, Jianhua Cui, Zdravka Metz.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 10 \$.

UEA-kodo: kebk-d.

Limdato por la venonta numero: 1^a de junio de 1993.

Esperanto-Societo Kebekia

6358-A, rue de Bordeaux

Montréal, Québec

H2G 2R8

telefonrespondilo: (514) 272-0151

Feuillets thématiques

Vous pouvez recevoir gratuitement des exemplaires des six feuillets thématiques publiés par la S.Q.E., portant sur les sujets suivants:

- pourquoi un accusatif en espéranto
- comment apprendre l'espéranto
- correspondre en espéranto
- miser sur l'espéranto: l'histoire d'une langue bien mal partie
- quelques revues espérantistes
- l'espéranto et les voyages

D'autres feuillets sont en préparation, et la première leçon du cours gratuit par correspondance est toujours disponible.

Il vous suffit de nous faire parvenir une enveloppe (10,5 cm x 24 cm) pré-affranchie (43¢ pour d'un à cinq feuillets, 67¢ pour six ou sept) et pré-adressée. Une plus grande enveloppe demande au moins 86¢ d'affranchissement.

Ĉu vi baldaŭ transloĝiĝos? Ne forgesu sciigi nin pri via nova adreso.

Déménagez-vous bientôt? N'oubliez pas de nous faire connaître votre nouvelle adresse.

■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■ ■

Salutas ĉiujn ESKanojn Trefflé
Mercier, de la Ŝerbruka
Esperanto-Societo.

Du droit de vote au droit d'être nommé sénateur: le séminaire international de la Jeunesse espérantiste allemande

Yves Bellefeuille

La première fois que j'ai participé à l'*Internacia Seminario*, le séminaire organisé chaque année pendant la semaine du jour de l'An par la *Germana Esperanto-Junularo*, la Jeunesse espérantiste allemande, je venais d'avoir dix-huit ans, âge minimal pour avoir le droit de vote au Canada. La deuxième fois que j'y ai participé, cet hiver, je venais d'avoir trente ans, âge minimal pour être nommé sénateur. Il est aisé de voir qu'à ce rythme, j'y participerai la prochaine fois en 2004, alors que j'aurai 42 ans — âge qui, à ma connaissance, n'entraîne aucun droit particulier, mais auquel on commence quand même à être un peu vieux pour participer à des activités de jeunes.

L'*Internacia Seminario*, dont la première édition a eu lieu en 1957-58 à Mainz, s'est depuis taillé une place enviable dans le calendrier espérantiste jeunesse; deuxième évènement traditionnel, il n'est surpassé que par l'*Internacia Junulara Kongreso* lui-même. Rassembler 235 espérantistes un 1^{er} janvier, il faut le faire! Mais il faut ajouter que l'I.S. (dire: i-so), contrairement à l'I.J.K. (dire: i-yo-ko), n'a aucun caractère d'«assemblée générale annuelle», ce qui en augmente sans doute l'intérêt pour plusieurs — notamment pour certains organisateurs d'I.J.K. qui souhaitent participer à un congrès plutôt que de l'organiser.

Il ne doit pas arriver souvent qu'une personne ait l'occasion de comparer le même évènement à douze ans de distance, surtout lorsqu'il s'agit d'un congrès pour jeunes. Heureusement, j'ai pu constater que tout ce qui faisait de l'I.S. une rencontre si agréable il y a une douzaine d'années est encore présent; d'autre part, quelques innovations fort amusantes s'y sont greffées pendant cette période.

Il n'est pas facile de décrire l'I.S. à quelqu'un qui n'y a jamais participé, et qui n'est peut-être jamais allé à une rencontre espérantiste internationale. Imaginez un énorme party d'une semaine avec deux cents amis intimes. Même celui pour qui il s'agit de la première rencontre espérantiste n'y trouvera pas d'étrangers, mais plutôt des dizaines de vieux amis qu'il ne connaît tout simplement pas depuis très longtemps. Pendant ces rencontres, les participants restent ensemble, jour et nuit, pendant sept jours. Toutes les activités sont communes: le programme, bien entendu, mais également les repas, les activités de soirée et même le logement, puisque tous résident au lieu du congrès (honne soit qui mal y pense!). Dans de telles circonstances, il faudrait vraiment être dénué de toute aptitude sociale pour ne pas se faire rapidement des amis.

L'I.S. se déroule toujours du 27 décembre au 3 janvier et le clou est

évidemment la veille du jour de l'An (ou la Saint-Sylvestre, comme les Allemands préfèrent le dire; consultez votre calendrier des saints). La coutume de la soirée du 31 décembre existait bien sûr en 1980, mais voici que deux nouveaux éléments sont apparus. D'abord, plusieurs congressistes ont pris l'habitude de se mettre sur leur trente-six pour cette soirée, ce qui, il faut l'avouer, détonne de ce qu'on est habitué à voir à une rencontre espérantiste. Ensuite, chacun doit maintenant fêter le Nouvel An à minuit selon l'heure du lieu où il habite. Pour les Européens, cela ne pose pas de problème grave, mais pour les Québécois et les Canadiens, c'est autre chose. (On m'affirme qu'il existe une photo de moi prise vers 5h15 alors que je me suis quelque peu assoupi, pour ainsi dire, en attendant le minuit d'Ottawa.) Mais je ne crois quand même pas avoir été le seul à manquer le déjeuner du 1^{er} janvier.

Enfin, je n'ai pas pu résister à l'envie de comparer les listes des participants des I.S. de 1980 et de 1992, afin de voir combien de personnes ont participé aux deux. En fait, bien peu: trois Allemands — Martin Haase, Andreas Münchow et Elisabeth Schwarzer — et moi-même. Au moins, la représentation canadienne a doublé pendant cette période, passant de deux à quatre.

Varmkoraj esperantistoj en malvarma lando

Cui Jianhua

Le cercle espérantiste d'Ottawa a organisé en février une fin de semaine, à laquelle ont participé une douzaine de Montréalais. En voici un reportage de la part d'une espérantiste chinoise en séjour à Montréal.

Otavo estis al mi ankoraŭ pli mistera ol Montrealo. Ĉar antaŭe mi neniam surmetis piedojn sur tero, kie la popolanoj parolas lingvon, kiun mi ne komprenas nek parolas, kie sur la stratoj la ŝildoj saltas en miajn okulojn nur kiel literoj sensignifaj, mi timegis, ke mi ne povos bone distingi kio estas simpla loĝejo aŭ ambasadejo, kio estas artmuzeo aŭ funebrejo.

La 19^a de februaro 1993 estis sunbrila tago, kaj mi kun 12 montrealaj esperantistoj kuraĝe ekpaŝadis en tiu nekonata kaj mondfama urbo por ĉeesti semajnfinan esperantistan renkontiĝon.

Vespere, kiam ekaŭdeblis japana tamburmuziko, mia timega sento jam forkuris, nenie trovebla. Sed la hundidino Bejla ektimis kvazaŭ ŝia animo saltus el ŝia korpo. Ŝi glite forkuris eksteren kaj poste scivoleme

enŝovis sian kapon por rigardi, kio efektive okazis al tiuj gajaj homoj.

Por ĝui bonan restadon en iu urbo, plej grava afero estas trovi loĝejon. Sed en la Otava E-renkontiĝo, neniu maltrankviliĝis pro tio. Post la vesperprogramoj, ĉiuj facile trovis sian gastiganton. Mi havis grandan honoron tranokti kun Márta en la bela loĝejo de Suzana. En tiu domo ni dancis frumatene kaj faris sandviĉon profundnokte. Mi ĝuis kun granda intereso la artaĵojn faritajn de Suzana. Ĉiuj tiuj artaĵoj same allogis min kiel tiuj en la Nacia Art-Muzeo dum la dimanĉa vizito, gvidita de Suzana.

Sabaton, ni iris sketi ĉe la kanalo Rideau. Tie mi unuafoje proprukule vidis kiel junaj kaj maljunaj gesketantoj lerte, rapide kaj bele glitis. Kuraĝigita de esperantistoj, mi decidis provi. Mi surmetis sketsuojn kaj mallerte iris al la

sketejon, apogante min dekstre ĉe Zdravka kaj maldekstre ĉe Silvano. Ho! Dio mia! Kial la piedoj ne obeis mian menson. Mi falis, la koksosto doloris, kaj mi rapide finis la provadon. Sed mi ne forgesis preni foton por fanfaroni post reveno al Ĉinio.

Vespere, en la domo de Rikardo Piper en Hull, antaŭ la flamanta kameno, en varma etoso, la esperantistoj ĝojplene interparolis kaj gustumis la diversspecajn manĝaĵojn portitajn de otavaj fervoraj esperantistoj. Post mia prelego pri Ĉinio, la entuziasma aplaŭdo montris, ke mi estis bone komprenita, kvankam mi ne scipovas paroli ilian gepatran lingvon.

Vintro, neĝo, frosto daŭras kaj daŭradas en via lando, sed mi sentas la varman koron, fervoron kaj afablecon de esperantistoj. Mi elkore dankas la otavajn kaj montrealajn samideanojn.

Aliĝilo al la printempa renkontiĝo — Formulaire d'inscription à la rencontre printannière

Nomo(j): _____ Telefonnumero: _____

Nombro de partoprenantoj / nombre de participants: _____

Dormo en propra tendo / coucher sous sa tente (15 \$)

Dormo en domo / en chalet (25 \$)

ESKanoj / membres de la S.Q.E. (-5\$)

La commande et le **paiement** complet et non-remboursable des repas doit atteindre la Société **au plus tard** le vendredi 4 juin. Les commandes tardives **ne seront pas** remplies.

Mendo kaj plena neredonebla **pago** por manĝoj **nepre** atingu la Societon ĝis vendredo 4^a de junio. Malfruajn mendojn oni **ne** plenumos.

Sabaton / samedi

Matenmanĝo / déjeuner ___x 3\$

Tagmanĝo / dîner ___x 7,50\$

Vespermanĝo / souper ___x 7,50\$

Dimanĉon / dimanche

Matenmanĝo / déjeuner ___x 3\$

Tagmanĝo / dîner ___x 7,50\$

Kroma donaco al E.S.K. / don supplémentaire à la S.Q.E. _____ \$

Sumo inkluzivita / somme incluse _____ \$

4 Printempo de 1993

Sendu kun la pago al / envoyer avec le paiement à: Société québécoise d'espéranto

Petit test sur l'importance de l'anglais dans le monde

Additionnez les points correspondant à vos réponses. Vous trouverez la solution ailleurs dans ce numéro.

1. De quelle proportion de la population mondiale l'anglais est-il la langue maternelle?

- a) 23,4% (4 points)
- b) 12,8% (3 points)
- c) 6,8% (2 points)
- d) 1,2% (1 point)

2. Il existe des périodiques de langue anglaise hors des pays anglophones. Quel est leur tirage total?

- a) 750 millions (3 points)
- b) 90 millions (2 points)
- c) 15 millions (1 point)

3. Durant les 30 dernières années, la proportion de la population mondiale de langue maternelle anglaise a-t-elle diminué, augmenté, ou est-elle restée stable?

- a) diminué (1 point)
- b) augmenté (3 points)
- c) est restée stable (2 points)

4. Lors des conférences internationales des Nations Unies:

- a) on parle presque exclusivement anglais (4 points)
- b) on recourt à des interprètes dans 11 p. 100 des cas (3 points)
- c) on recourt à des interprètes dans 55 p. 100 des cas (2 points)
- d) on recourt presque toujours à des interprètes (1 point)

5. La (les) langue(s) officielle(s) des organisations internationales est (sont):

- a) presque toujours l'anglais (3 points)
- b) presque toujours l'anglais avec une ou quelques autres (2 points)
- c) le plus souvent plusieurs langues, ou aucune (1 point)

6. Si, lors d'une conférence internationale, les interprètes se mettent en grève, ou si une panne interrompt l'interprétation simultanée:

- a) on doit le plus souvent ajourner les débats (1 point)
- b) on continue le plus souvent en anglais (2 points)

7. En Suisse, les langues officielles sont l'allemand, le français, l'italien et le romanche. Au parlement suisse:

- a) on parle les quatre langues, mais on traduit les documents (1 point)
- b) on parle les quatre langues, mais on n'a pas besoin de traduire les documents, car les Suisses parlent presque tous plusieurs langues (2 points)
- c) lors de difficultés de compréhension, on utilise le plus souvent l'anglais (3 points)

8. Des 174 États souverains du monde, 109 ont plus de trois millions d'habitants. De ces 109 États:

- a) 49 ont l'anglais comme seule langue officielle, et 24 utilisent l'anglais et une ou quelques autres langues (3 points)
- b) 25 ont l'anglais comme seule langue officielle, et 14 utilisent l'anglais et une ou quelques autres langues (2 points)
- c) 10 ont l'anglais comme seule langue officielle, et 8 utilisent l'anglais et une ou quelques autres langues (1 point)

Vous trouverez les réponses à la page

7. [Monato, fév. 92]

ELNA en congrès à Hartford

L'association états-unienne d'espéranto (Esperanto-Ligo por Norda Ameriko) tiendra son congrès annuel tout près d'ici, à Hartford, au Connecticut, du samedi 17 juillet au mardi 20 juillet 1993. Coût prévu: 50 US\$ pour le congrès, et 40 US\$ par nuit et par personne. Informations: ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrio CA 94530.

Un nouveau bulletin sur le problème des langues et l'espéranto est publié en anglais aux États-Unis, sous le titre *Esperantic Studies*. On peut le recevoir en écrivant à Esperantic Studies Foundation, 3900 Northampton Street NW, Washington DC 20015.

Cours d'espéranto aux États-Unis

Trois cours intensifs d'espéranto se tiendront cet été aux États-Unis. Le plus célèbre, celui de l'université d'État de San Francisco, aura lieu du 28 juin au 16 juillet et se donnera pour la 24^{ème} année. Celui de Hartford, au Connecticut, du 11 au 17 juillet, précédera le congrès de l'association états-unienne d'espéranto. Le dernier se tiendra du 21 juin au 2 juillet, à Dallas, en Caroline du Nord.

Comme c'est malheureux!

Le préfixe **mal-** ne signifie pas **mal**. C'est simple! Il signifie simplement **le contraire de**. Observez-le dans les mots français suivants:

malheureux
maladroit
malchanceux
malhonnête

Le préfixe **mal-** de l'espéranto ne veut donc pas dire de façon mauvaise ou indigne, ou pas bien, comme dans «Il a mal agi». Il indique simplement et uniquement **le contraire**.

malami: détester
malfermi: ouvrir
malgrnada: petit

Mal- est une particule merveilleuse qui permet d'apprendre un mot, comme **granda**, et de connaître son contraire sans même avoir à l'apprendre. C'est un peu comme si elle nous faisait cadeau de la moitié du dictionnaire.

Parfait ou imparfait?

Que signifie au juste **mi manĝis: j'ai mangé** ou **je mangeais**?

En espéranto, on n'emploie le plus souvent que la forme simple du passé, la finale **-is**, que l'on veuille exprimer un passé composé, un passé simple ou un imparfait. Tout verbe au passé prend la finale **-is** tant que l'on ne ressent pas la nécessité d'une plus grande précision. Lorsque c'est le cas, on peut utiliser une autre forme verbale, forme qui correspond à l'imparfait du français.

L'imparfait situe dans le temps une action par rapport à une autre, implicite ou explicite. On ne dirait pas: «Ce matin, je mangeais là» sans ajouter autre chose. On est plutôt porté à dire: «Ce matin, j'ai mangé là». On dit cependant: «Je mangeais **quand tu est arrivé**», ou «**Je ne pouvais pas parler**, je mangeais» (c'est-à-dire que je mangeais au moment où il aurait fallu que je parle).

En espéranto, cette nuance est apportée par la forme **esti —anta**: **Mi estis manĝanta** = j'étais en train de manger, je mangeais. Le **-ant-** de **manĝanta** jouant à peu près le même rôle que le **-ant** en français, vous pourrez mieux retenir ceci en traduisant ainsi la phrase: j'étais mangeant.

Lorsque nous apprenons l'espéranto, nous sommes souvent portés à traduire chaque imparfait par un **estis —anta**, mais on se rend bientôt compte (et on se le fait dire!) qu'il ne faut pas alourdir son parler par une précision souvent inutile. Il faut accepter de parler **espéranto**, sans vouloir y traîner tous nos réflexes français.

Ne croyez cependant pas que l'espéranto manque de précision. Lorsqu'il importe de situer parfaitement une action dans le temps, l'espéranto rend facilement des nuances que l'on ne retrouve même pas en français. Par exemple: **Mi estis manĝonta**: je n'avais pas encore mangé mais j'allais le faire.

Une, deux, trois...

En espéranto, les nombres sont des mots invariables. On dit: **Mi havas tri katojn**, et non **Mi havas trin katojn**.

On écrit les nombres en lettres en utilisant autant de mots que le nombre compte de chiffres, les zéros exceptés. Par exemple: **mil naŭcent naŭdek tri** (1993), ou **dumil du** (2002).

Les nombres ne prennent ni l'accusatif ni le pluriel, et sont en ce sens invariables, mais ils sont tout de même transformables.

du: deux
duo: paire
dua: deuxième
due: deuxièmement
mil-naŭcent-naŭdek-tria: mille neuf cent quatre-vingt-treizième

Raporto pri la I.J. K.

Laurinda MacGillivray

Une espérantiste de Nouvelle-Écosse relate ici l'importance des conversations individuelles lors de son premier congrès espéranto, à Montréal.

Ĉi-somere mi ĉeestis mian unuan Esperantan kongreson, en Montrealo. Mi estis iomete timema antaŭ ol mi iris al la kongreso. Malgraŭ la fakto, ke mi jam parolis Esperanton dum kelkaj jaroj, la antaŭvido renkonti pli ol cent nekonatojn el multaj landoj estis por mi timiga.

La realeco, tamen, estis tute alia; ĉiu partoprenanto estis afabla. Estis facile diri al nekonato: «Saluton! Mi estas Laurinda, el Kanado. Kiel vi nomiĝas?» kaj ekbabili pri io ajn. Estis multaj interesaj kaj ĝuindaj okazaĵoj dum la kongreso — lingvokursojn, diskutoj, ekskursoj, ktp — sed egale grava estis la babilado. Mi diskutis pri sciencfikciaj verkistoj kun rusoj, pri svedaj muzeoj kun germanoj, kaj pri la pola labor-situacio kun polino. Mi opinias ke tiuj neformalaj konversacioj ne eblus en alia situacio.

Okazo, kiu impresis min, estis vizito de Michael Schmidt, germana konsulo kaj Esperantisto. Li legis pri la kongreso en gazeto kaj venis por mallonga vizito. Li tagmanĝis kaj babilis kun ni, kuraĝigante nin daŭrigi niajn «Esperantajn vivojn». La plejparto el ni havis preskaŭ nenion komunan kun diplomato, sed ni interparolis afable kaj libere.

Tiu okazo emfazis por mi la neformalan, malfermitan etoson de la kongreso. Oni ofte legas, ke Esperanto kreas ligilon inter homoj el malsimilaj landoj kaj vivkondiĉoj; ĉe la I.J.K. tio montriĝis. Por mi, vere ŝajnis kiel «rondo familia». Me ege ĝuis mian unuan kongreson kaj esperas povi ĉeesti aliajn en la estonteco. [Inter Ni, n^{ro} 80, decembro 1992]

Junularo Esperantista Kanada ŝajne revigliĝis post la Montreala I.J.K. Eldoniĝis dum aŭtuno de 1992 bulteno, redaktita de Cleve Lendon. Ĝi ĉefe pritraktas la kongreson kaj la renaskiĝon de JEK.

La tiama ĝardeno

Émile Nelligan
elfrancigis Jean-Claude Bélanger

Nenio pli dolĉas ol reveni,
Kiel post longa foresto,
Nenio ol reveni
Per rememora vojo
Kie floras la naiveca lili',
Al l'infanaĝa ĝardeno.

Al la ŝloszonita ĝarden', la muta ĝarden'
El kiu forflugis la sinceraj gajoj,
El nia silenta ĝarden'
Kaj menuetdancaco
Kiun tiame instigis subbranĉe
La fratinoj niaj, vestitaj blanke.

En aprilaj tiamaj vesperoj, kun krioj gajaj
Intermiksitaj de rekantaĵoj,
Kun kantoj gajaj
Iŝi pasadis glori-enokule,
Sub la tremantaj laŭboj
Samkiel en vilaĝaj valsoj.

Dume venis el funde de la vilao
Akordoj de antikva gitaro
El la malnova vilao
Kiuj tie divenigis al ni
Ĉe ombrigaj latŝutroj
Lun muzikistinon.

Sed ankaŭ, nenio pli maldolĉas ol pensi
Pri tiom da ruinaĵoj
Ja maldolĉas pensi
Kiam ni tiel revenas
Laŭ velkitaj floraj vojetoj
Al niaj junaj jaroj.

Kiam ni sentas nin maljunigitaj kaj neŭrozaj,
Vunditaj, mistraktitaj kaj sen rimedo
Maljunaj kaj neŭrozaj
Kaj kiam, surflosante la forgesojn,
Eterniĝas kun siaj ĉarmo
Nia ploranta juneco.

Réponses de la page 5

Si vous avez accumulé 8 ou 9 points, vous sous-estimez l'influence de l'anglais; 10 ou 11, vous avez une bonne idée de la situation; de 12 à 15 points, vous vous faites des illusions à propos de l'anglais; de 16 à 25 points: l'anglais est pour vous un véritable mythe.
Réponses: 1-c, 2-c, 3-a, 4-c, 5-b ou c, 6-a, 7-b, 8-c.

La Riverego 7

Nova artefarita lingvo

Des amateurs de logique ont récemment ressuscité et amélioré un projet de langue à logique formelle. Une telle langue est-elle humainement possible?

Dum la pasintaj du jaroj entuziasmuloj de logikaj lingvoj sukcesis revivigi eksperimentan lingvon pli frue publikigitan per 1960a artikolo en la ĵurnalo *Scientific American*. Bazita sur la pli frua *Loglan* (kunfando el anglaj vortoj kun signifo «logika lingvo»), la amplekse referita *lojban* posedas ne nur plene difinitan gramatikon, bazan vortaron kaj vortformadajn algoritmojn, sed ankaŭ imponan aron da komputil-programoj por sintaksa malkombinado, lernado de la vortaro kaj produktado de frazoj.

Scio de matematika logiko

evidentiĝas en la predikata formo de lojbanaj bazvortoj. Ekzemple, *klama*, uzata en formo «klama X Y Z» estas difinita kiel «veni/iri al X el Y tra Z». Vortetoj *se*, *te*, *ve* produktas *seklama* (destino), *teklama* (origino) kaj *veklama* (vojo).

La frazo *mi djica le nuke do klama* (laŭvorte «mi volas la okazaĵon de via venado/irado») laŭ algoritmo malkombiniĝas al *mi djica [le nuke (do klama)]* certigante mankon de dubsenceco. Algoritmoj regas ankaŭ la formadon el vortetoj de spactempaj vortoj; ekzemple: *puvi* = estis/faris en ĉi

tia punkto; *puzu* = estis/faris antaŭ longtempe; *vuvehu* = granda tridimensia regiono tie; *vuvehuzaizeho* = pasanta tre proksime al ĉi tie.

La origina celo de la loglana — nome esploro pri la hipotezo de Whorf, ke lingvoformo enformigas pensmanieron — daŭras interesi lojbanistojn. Ĉu la lojbara lingvo estas parolebla aŭ eĉ pensebla, ankoraŭ ne certas; tamen estas klare, ke multaj uzantoj de la lingvo jam malkovris la ebrigon de lingva artefarado. [Monato, feb. 1992]

Abonnez vos ami-e-s — Abonigu viajn geamikojn

Abonnez vos ami-e-s à *La Riverego* et faites davantage connaître l'espéranto! D'ici au 1^{er} septembre, tout nouvel abonnement que vous nous ferez parvenir — au coût réduit de 7\$ pour un an — vous donne une chance de gagner un bon d'achat de 25\$ à la *Librairie espérantiste de Montréal*. De plus, trois nouveaux abonnements vous permettront de prolonger d'un an votre adhésion à la Société québécoise d'espéranto, gratuitement. Tous les nouveaux abonnés recevront des informations sur l'espéranto et la S.Q.E. Cette campagne prend fin le 1^{er} septembre 1993.

Abonigu viajn geamikojn al *La Riverego* kaj diskonigu Esperanton. Ĝis la unua de septembro, ĉiu novabonigo de vi sendita — laŭ rabata prezo: 7 \$ por unu jaro — donos al vi unu eblecon gajni 25-dolaran aĉetraĵon ĉe la *Libroservo en Montrealo*. Krome, ĉiu triopo da abonigoj senpage plilongigos vian membrecon en E.S.K. je unu jaro. Ĉiuj novabonantoj ricevos informon pri Esperanto kaj pri E.S.K. Tiu kampanjo finiĝos la unuan de septembro 1993.

Via nomo / votre nom: _____

Mi abonigas la jenajn homojn / j'abonne les personnes suivantes:

Nomo: _____

Adreso: _____

Nomo: _____

Adreso: _____

Nomo: _____

Adreso: _____

Mi kromdonacas al E.S.K. / Don supplémentaire à la S.Q.E.: _____ \$

Mi pagas entute / Somme ci-incluse: _____ \$ Pagu al / payez à: Société québécoise d'espéranto